ANTAŬEN suplemento de Informilo 2/30 xxxx junio 2022

Enhavo: Batalo ĉe Hradec Králové

# Batalo ĉe Hradec Králové

La batalo nomata ankaŭ batalo ĉe Sadová aŭ batalo ĉe Königgrätz, okazis la 3an de julio 1866 sur la monteto Chlum apud Hradec Králové/Königgrätz en Ĉeĥio kaj decidis la Prusan-Aŭstrian militon inter Prusio kaj Aŭstrio favore al Prusio, kiu jam antaŭe venkis en la batalo de Langensalza.

La batalo ĉe Hradec Králové estis post batalo ĉe Leipzig en Germanio la dua plej granda batalo de la 19-a jarcento, kun partopreno de 436 000 soldatoj. Laŭ la nombro de soldatoj la batalo estas la plej granda, kiu okazis en Ĉeĥio.




La batalkampo troviĝis nord-okcidente de la urbo Hradec Králové inter la rivero Labe (Elbo) kaj la vilaĝoj Hořiněves, Benátky, Sadová, Mokrovousy kaj Dolní Přím kaj okupis spacon de 10 km x 15 km.

La prusa armeo, kiun gvidis la reĝo Vilhelmo 1. kaj la generalo Helmut von Moltke, ĉi tie venkis kaj tute detruis la aŭstria-saksian armeon, kiun gvidis Ludviko von Benedek.

Prusio en tiu batalo tre efike uzis modernan teknikon, precipe sian nadloprajman fusilon kaj la avantaĝojn de telegrafo kaj fervojo.

La aŭstria kaj saksia armeoj komencis sin preparadi sur la dekstra bordo de la rivero Labe (Elbo) jam la 2-an de julio. Post noktmezo ili dislokiĝis en proksimume duonronda linio, kiu estis longa je 10 km inkluzive de la monteto kaj la vilaĝo Chlum. Parto de la armeo restis en rezervo. Kontraŭ ili staris tri prusaj armeoj, kiuj venis de diversaj direktoj kaj post lokaj bataloj atingis la batalkampon ĉe Hradec Králové.




La batalo komenciĝis dum tagiĝo de 3.7.1866. Ĝis tagmezo aŭstrianoj havis superecon. La aŭstria artilerio ekipita per modernaj bronzaj kanonoj kun pafdistanco de kelke da kilometroj rebatis per pafado atakon de la Unua prusa armeo, kiu atakis de la vilaĝo Lípa.

La ekipon de la aŭstriaj infanterianoj superis Prusio, ĉar prusaj soldatoj estis ekipitaj per nadloprajmaj fusiloj, kiuj estis konstruitaj laŭ Johann Nikolaus Dreyse, kaj la aŭstria armeo uzis fusilojn konstruitajn de J. Lorenz, kiuj havis pli longan pafdistancon kaj precizecon. Sed la ŝargado daŭris pli longe ol ĉe la

prusaj fusiloj. Do la aŭstrianoj ne povis sufiĉe bone uzi bajonetan atakon, ĉar la prusoj pafadis tre rapide.



Decida momento venis, kiam du gravaj partoj de la aŭstria armeo komencis (laŭ strategia vidpunkto senutile) batali kun prusoj en la arbaro Svíb. Per tio ili malkovris la dekstran parton de sia defendlinio. En tiu momento venis de nordo la Dua prusa armeo kaj okupis la monteton Chlum.

Al la aŭstria armeo minacis sieĝo. Do ĝi komencis cedon. La cedo estis protektita per kavalerio. Tiam okazis granda kavaleria batalo kun 11 000 kavaleriistoj proksime de Střezetice .La lasta kavaleria batalo en nia lando. Tie mortis 1600 viroj kaj 2000 ĉevaloj. Entute estis perdoj teruraj, ĉar pli ol 10 000 junaj viroj perdis la vivon kaj pli granda nombro da soldatoj estis grave vunditaj.



La cedo de la aŭstria armeo ĉesis ĉe la rivero Danubo.

La rezulto de la batalo estis la venko de Prusio, kiu gvidis al la prusa atako en Francio, unuiĝo de Germanio kaj iom poste al la unua mondmilito.

Por Aŭstrio tio estis perdo de potenco, perdo de norda Italio, aperis Aŭstrio-Hungario, nun kiel aliancano kun Germanio.

La batalon ĝis nun lmemorigas pli ol 480 memoraĵoj, tombejoj kaj lokaj nomoj, ekzemple la Aleo de mortintoj.









Lokaj bienmastroj ankaŭ timis plugi ĉi tie kampojn ĝis la 20-a jarcento kaj estas lokoj, kiujn iliaj posteuloj evitas ĝis nun.

Ladislav Hakl